


Eŭropa Bulteno

Septembro 2017, Numero 173

PROJEKTO DE EEU "RAKONTOJ DE REMEMORO" ALPROKSIMIĜAS AL LA FINO



En septembro 2016 oficiale komenciĝis la projekto "Rakontoj de rememoro", financata de la eŭropunia programo Eŭropo por civitanoj, kies kuorgidganto estas EEU. La celo de la projekto estis pere de rememoro pri rifuĝintoj el eksjugoslavaj ŝtatoj dum la milito helpi kompreni la hodiaŭajn rifuĝintojn ĉie en Eŭropo el iom alia perpektivo. Dum la projektodaŭro necesis organizi plurajn eventojn en landoj de ĉiuj partneraj organizoj en la projekto. Nun la projekto alproksimiĝas al la fino kaj ĉi somere okazis lastaj planitaj eventoj. La baza ideo de la projekto estis organizi ekzpozicion kaj publikajn diskutojn pri rifuĝintoj tiam kaj hodiaŭ en Aŭstrio, Germanio, Slovakio kaj Slovenio. La kreintoj de la projektideo estis Maja Cimerman Sitar kaj Matej Sitar de la slovena Asocio por eŭropa konscio kaj Maja Tišljar de EEU. Matej Sitar transprenis la kreadon de la ekzpozicio en kiu partoprenis 4 profesiaj fotistoj: Imre Szabo kaj Borut Kranjc kun fotoj de rifuĝintoj de la milito en eksjugoslavio unuflanke kaj Florian Rainer kaj Istvan Bielik kun fotoj de rifuĝintoj al Eŭropo dum 2015. Impresa kaj kortuŝa ekzpozicio montris rifuĝintojn kaj iliajn rakontojn. La sama ekzpozicio estis inter

aprilo kaj julio 2017 prezentita entute 5 foje: en Partizánske, Berlino, Maribor, Graz kaj Bad Radkersburg. Publikaj diskutoj organizitaj en tiuj urboj estis malsamaj kaj adaptitaj al la konoj de la publiko kaj situacioj en tiuj landoj.




Nur en Maribor krom la ekspozicio kaj la publika diskuto kiel en ĉiuj aliaj landoj estis planitaj kromaj okazaĵoj. Tie printempe estis organizita legado de la libro "Hotel Zagorje" de kroata aŭtorino Ivana Bodrožić en du apudlimaj lernejoj en Slovenio kaj Aŭstrio en la urbetoj Šentilj kaj Spielfeld. Lernantoj legis la libron pri knabino kiu krieskis en Kroatio kiel rifuĝinto kaj poste verkis tekstojn pri ĝi aŭ aliaj temoj rilataj al rifuĝintoj. En la Aŭstra lernejo oni kadre de nia iniciativo organizis tutan temsemajnon dediĉitan al la milito en eksjugoslavio kaj la Asocio por eŭropa konscio organizis surloke prelegojn kaj diskutojn kun gelernantoj. Somere en alia lima urbeto Bad Radkersburg estis organizitaj foto kaj filozofiaj laborejoj por infanoj el ambaŭ landoj. La tekstoj de lernantoj estis prezentitaj kiel parto de la fotoekspozicio en Maribor. Tiu ekspozicio estis tre interesa ankaŭ el la vidpunkto ke la Asocio por eŭropa konscio fakte organizis du ekspoziciojn kadre de du projektoj en du galerioj videalvide unu al la alia. Unuflanke estis prezentitaj fotoj de tiu ĉi projekto: profesiaj fotoj, tre emociaj, kiuj montras suferon de la rifuĝintoj dum la jugoslavia milito kaj en 2015. En la galerio rigardeblis ankaŭ filmoj kun intervjuoj kiujn lernenoj de la la arta lernejo en Maribor faris kun tri rifuĝintoj en Slovenio: 90-jara maljunulo kiu estis rifuĝinto dum la dua mondmilito, mezaĝa virino kiu venis kiel rifuĝinto de Bosnio al Slovenio en 1992 kaj junulino el Sirio kiu en 2015 venis al Slovenio. Aliflanke de la placo, en alia galerio, prezentiĝis ekspozicio de fotoj de rifuĝintoj el Sirio kiuj venis al Slovenio, kiujn ili faris mem survoje per siaj telefonoj. Tre sukcesa dialogo inter la akspozicioj de tute kontraŭaj fotoj kiuj montras aliron de eksteraj fotistoj kompare al la rifuĝintoj mem!

Junie EEU kadre de la Germana Esperanto-Kongreso en Freiburg organizis prezenton de la projekto por Esperantistoj. Baldaŭ pliaj informoj estos haveblaj ĉe la projekta paĝareto <http://storiesofremembrance.eu/en/>.

Maja Tišljár

GRANDIOZA ATINGO DE ESPERANTO EN EŬROPO PROJEKTO MULTLINGVISMA AKCELILO



La ideo pri Esperanto kiel ilo kiu helpas infanojn lerni post Esperanto naciajn fremdlingvojn estas malnova. Unua pri tio komencis paroli prof. Helmar Frank nomante tiun rolon de Esperanto propedeŭtika. Estis faritaj pluraj eksperimentoj por pruvi tion, sed tre konvinka pruvo ne estis trovita kaj la neesperantista mondo ne reagis je tiu nia aserto kaj pri grava rolo de E en plisukcesigo de multlingveco en EU. Antaŭ deko da jaroj EEU iĝis membro de Eŭropa platformo por

multlingveco kaj sukcesis atingi gravan dokumenton. Nome, tiu platformo akceptis en 2013 dokumenton en kiu ĝi parolas ankaŭ pri propedeŭtiko kaj alvokas la ministeriojn pri edukado eksperimenti pri tio per Esperanto. Sed ankaŭ tio ne atingis konkretan rezulton.

Grupo da Esperanto-entreprenoj kaj asocioj kaj kelkaj lernejoj jam tri jarojn okupiĝas pri difino de projekto, kiun ili realigus kaj kiun pagus Eŭropa Unio el la fondaĵo Erasmus +. Fine ĉi-jare tiu ĉi projekto sub la nomo Multlingvisma Akcelilo (Multilingualism Accelerator) estis akceptita ĉe la kroatia nacia agentejo por Erasmus+. La projekto devas esti realigita inter novembro 2017 kaj decembro 2019 per subvencio de proksimume 250.000 eŭroj kadre de la eŭropa programo Erasmus+. Tiun monon disdividos 9 partneroj. La kunordiga partnero estas Zagreba eldonejo Izvori, kiu jam eldonis kelkdek E-librojn. Aliaj partneroj estas: Inter-kulturo el Maribor (Slovenio) kiu dum jardekoj okupiĝas pri Zagreba lernmetodo, E@I el Partizánske (Slovakio) kiu ja estas konata pro multaj projektoj, Studio Gaus el Berlino (faka por elektronikaj solvoj kaj grafiko) kaj 2 universitatoj kaj tri elementaj lernejoj: Universitato en Maribor, Suddana Universitato el Odensee kaj lernejoj el Zagreb (Kroatio), Ŝentilj (Slovenio) kaj Vraca (Bulgario).

La projekto Multlingvisma Akcelilo kreas lernobjekton kiu baze de tre minimuma Esperanto ebligas al infanoj kompreni elementajn strukturojn de lingvoj ĝenerale kaj iom da lingva antaŭscio uzata en ĉiuj eŭropaj lingvoj. La enhavo de tiu lernobjekto baziĝas je esploroj faritaj ankoraŭ antaŭ 40 jaroj en Zagrebo, kiam mi mem esploris la plej oftajn morfemojn uzatajn en parola Esperanto kaj sur kiu fundamentas la tiel nomata Zagreba Metodo. Antaŭ du jaroj sinjoro Raymond Gerard kreis softvarojn per kiuj li sukcesis aŭtomatigi nombradon de morfemoj ene de E-tekstoj kaj nombrante la morfemojn en teksto de 2 milionoj da vortoj atingis tre similan rezulton kiel la mia, nome 95% de la tuta teksto estas kovritaj per nur ĉirkaŭ 500 plej oftaj morfemoj. Multlingvisma akcelilo decidis apliki nur tiujn morfemojn kiuj sufiĉas por kovri 90% kaj temas pri 250 plej oftaj morfemoj, do kvanto da vortoj tre malgranda kaj reale rapide lernebla de etaj lernejoj. La Multlingvisma akcelilo do estas lernobjekto kiu celas instrui minimuman Esperanton (250 morfemojn) al infanoj en la 2-a aŭ 3-a klaso de elementa lernejo. La celo estas ke ili efektive aktive ekparolu kaj ekuzu Esperanton kaj ke la objekton ne instruoj instruistoj, sed nur baze de instrukcioj stimulu ĝin



kiel animantoj. Tiel ni evitas la problemon de diplomitaj instruistoj (kiujn ja ni ne havas). Kiam ili povos uzi la lingvon kaj komuniki per ĝi kun infanoj el aliaj landoj, ili tre bone komprenos kiel funkcias lingvoj ĝenerale (kiel oni kunmetas vortojn, kio estas afiksoj, kio estas gramatikaj finaĵoj kaj reguloj kaj kiel oni kunmetas frazojn). Tiuj scioj grave helpas ilin kompreni komplikajn gramatikajn regulojn de

naciaj fremdlingvoj. Kompreninte ekz. kiun rolon havas akuzativo, ili facile komprenos kiujn rolojn havas la kazoj el lingvoj kun kazoj ktp. Pro tio lingvo, kiun ili eklernos en la 3-a aŭ kvara lernoklaso (ekz. la franca) progresos ĉirkaŭ 30% pli rapide ol ĉe infanoj kiuj antaŭe ne lernis Multlingvisman Akcelilon.


La projekto ligiĝos al la jam ekzistanta portalo por lerni Esperanton laŭ la Zagreba Metodo learn.esperanto.com el kiu oni lernos unuajn 6 lecionojn (250 morfemoj) kaj la partneroj ellaboros amason da pliaj didaktikaĵoj, helpiloj, paroliloj, stimuloj...

La projekto ampleksas ankaŭ eksperimenton parte apliki la Lingvan Akcelilon en 4 elementaj lernejoj en kiuj oni trovos po unu grupon da infanoj kiuj lernos la unuajn du lecionojn dum du monatoj kaj oni jam povos baze de tio kompreni kiom la lernobjekto vere kontribuas al sia celo.

Post la fino de la projekto en 2019 eblas fari novan projekton, kiu fakte baze de la materialoj kreitaj en Multlingvisma Akcelilo realigus veran grandan eksperimenton en minimume 10 elementaj eŭropaj lernejoj kiom fakte Multlingvisma Akcelilo rapidigas lernadon de tria aŭ kvara lingvo. Se tiu projekto estos aprobita kaj ĝi tre klare montros ke la infanoj kun antaŭa Multlingvisma Akcelilo 25-30% pli rapide lernas novajn lingvojn, tio ebligos postan politikan agadon, nome proponi al ministerioj pri edukado enkonduki en sialandaj lernejoj Multlingvisma Akcelilon, kio praktike signifas enkonduki Esperanton en lernejojn.

Zlatko Tišljarić

84-A ITALA KONGRESO DE ESPERANTO EN POLICORO (HERAKLEO) , 26.08. - 02.09.2017



Loko de la kongreso : La regiono Basilicata - urbo Policoro - meze de la antikva Heraclea, regiono konata kiel "Granda Grekujo" - "Magna Grecia" ekde la 4-a jarcento a.K. Tiu regiono estis "lulilo" de la nacia respektive eŭropa civilizo meze de Mediteraneo.

Dum la inaŭguro de la kongreso la prezidanto de la Regiono Basilicata substrekis la grandan honoron por la regiono ke tiel internacia Esperanto-kongreso povas okazi ĝuste ĉi tie. Kiel 2-a politika altrangulo ĉeestis la inaŭguron la prezidanto de la Provinco Matera. Li ĝoje bonvenigis la gekongresanojn kaj fiere parolis pri la nuna periodo de kultura aktiveco en sia teritorio kies kulmino estos la rekono de la Urbo Matera kiel Eŭropa kultura ĉefurbo por la jaro 2019.

La urbestro de Policoro kiel loka gastiganto priskribis la longan historion de la regiono en la Metaponta altebenaĵo, kie en la jaro 434 a.K. estis fondita "Herakleon". Cetere, la fama Pytagoras

naskiĝis ĉi tie. La prezidantino de la Itala Esperanto-Federacio, s-ino Mikaela Lipari bonvenigis pli ol 200 partoprenantojn el Eŭropo kaj eĉ el Sudameriko, Kubo, Madagaskaro, Israelo kaj Mongolio.

Tradicie dum italaj kongresoj okazas matene 2 seminarioj, ĉifoje kun la temo pri kulturo kaj komunikado en Eŭropo" (Osmo Buller) kaj "De Informado kaj Konsciigo al Publikaj Rilatoj" (Lu Wunsch-Rolshoven). Krome oni povis partopreni Esperanto-kursojn kaj tre interesan konversacian kurson pri mem elektitaj temoj sub gvido de la Hispano Rafael Mateos Gonzáles, kiu ek de 2006 instruis Esperanton en multaj landoj. Samtempe la gejunuloj havis propran programon kun multa muziko. Dum la kultura programo vespere elstaris denove la vigliga prezentado de la Duo Kaito. Anni kaj Nanne krome invitis al kanto-laborgupo. Esenca programo de tiu 1-semajna kongreso ĉiam estas duon-kaj tuttagaj ekskursoj al la historiera ĉirkaŭaĵo, ĉifoje ĉefe la pitoreska Regiono Basilicata kun siaj montoj kaj ĉarmaj vilaĝoj respektive urbetoj. Sub gvido de profesoro Carlo Minnaja marde posttagmeze kongresanoj estis gastoj en la Literatura Parko Carlo Levi, en Aliano, kie okazis dulingva debato pri literaturaj temoj.

Resume tiu itala kongreso estis ege riĉa laŭ programeroj. La vera internacia etoso tutsemajne ĝojigis nin ĉiujn. Elkoran dankon al la tuta kongresa teamo!

Dieter kaj Yoshie Kleemann

ESPERANTISTINO – KANDIDATO POR ŜTATPREZIDANTO DE RESPUBLIKO SLOVENIO



Esperantistino Ljudmila Novak el Slovenio estas unu el la kandidatoj por la nova ŝtatprezidanto de Slovenio. La balotoj okazos la 22-an de oktobro.

Ljudmila Novak estis en la mandato 2005-2008 membro de Eŭropa Parlamento kiam ŝi sufiĉe multe engaĝiĝis por Esperanto, ŝi ebligis ke okazis afiŝekspozicio pri Esperanto en la ejoj de Eŭropa Parlamento kaj postulis ke oni traktu du ŝiajn proponojn pri

Esperanto en la Komitato por kulturo de la Eŭropa Parlamento. Ŝi estis aŭspicianto de la kongreso de EEU en Maribor en 2007 kaj mem partoprenis en la kongreso same kiel en kelkaj aranĝoj en Bruselo organizitaj de EEU. Ŝi iĝis honora membro de EEU.

Ŝi lernis E-on en gimnazio en Maribor kaj partoprenis en 2 TEJO-kongresoj en sia juneco. Ŝi nun estas membro de la parlamento de Slovenio kaj prezidantino de la partio Nova Slovenija.

Zlatko Tišljar

NOVAJ TREJNITAJ INSRUISTOJ EN POZNAN



Kadre de la Interlingvistikaj Studoj en Poznan en la tria jaro de la studoj oni povas specialiĝi pri kelkaj fakoj, inter ili ankaŭ pri metodologio de instruado de Esperanto. Por ke la grupo estu pli granda kaj el la instruado povu profiti pli da personoj ILEI kaj edukado.net kunlaboras kun UAM kiu ebligas al la interesiĝantoj unuĵaran trejnadon.

Tiu programo konsistas el dufojaj unusemajnaj renkontiĝoj en Poznan, en septembro kaj en ferbuaro kaj inter tiuj renkontiĝoj oni rete laboras, studas, solvas testojn kaj taskojn. La metodikan laboron (surbaze de sia kurso RITE) gvidas Katalin Kovats, redaktoro de

edukado.net, kaj pri la aldonaj studobjektoj la kursanoj partoprenas lekcionojn kune kun la la studentoj de la Interlingvistikaj Studoj.

Tia trejnado finiĝis nun en septembro kaj sukcese ekzameniĝis 5 personoj el 3 landoj. La finekzameno konsistis el prezento de modellecionoj kaj praktikaj klarigoj de gramatikaĵoj, kadre de la teoria ekzameno la kandidatoj ricevis demandojn pri literaturo, movadhistorio kaj gramatiko.

Ĉiu devis pretigi ankaŭ studfinan laboraĵon, laŭeble pri praktika temo kaj post mallonga prezentado ankaŭ defendi sian verkon. Krystina Worobiej el Pollando skribis pri la Tabuludoj en la instruado de Esperanto, Marketa Wilkus pri la Aplikado de ludoj en la instruado, Jean-Claude Roy el Francio pri la temo Esperanto en lingvokafejoj kaj Mariusz Hebdzyński el Pollando pri Esperanto MMA aŭ konfronto de miksitaj lingvoartoj. El inter la studentoj de la 3-jaraj Interlingvistikaj Studoj Felix Jimenez Lobo el Hispanio verkis studojn kun la titolo "Analizo de kvar lernolibroj de Esperanto por hispan-lingvanoj". Kelkaj pliaj studentoj planis ankoraŭ ekzameniĝi, sed pro diversaj kialoj ili fine ne sukcesis plenumi la lastajn taskojn, do, ilin ni reatendas en la sekva jaro.

La nova grupo de Interlingvistikaj Studoj startis en la sama semajno kun 21 personoj, kun pluraj eĉ el Azio. Ni forte esperas ke post du jaroj multaj el ili elektos specialiĝi pri metodiko kaj post tri jaroj finas siajn studojn kun oficiala universitata diplomo pri instruado pliaj novaj kolegoj. En la nomo de la kunekzamenoj kaj kolegoj mi kore gratulas la novajn diplomitojn kaj deziras al ili sukcesan aktivadon en Esperantujo.

Katalin Kovacs

RETRADIO

Projekto de Anton Oberndorfer el Aŭstrio, kiu ankaŭ prelegis kaj gvidis seminarion dum la 16-a ĈEA-Kongreso en Pelhřimov, elsendas por vi ĉiutage novan kelkminutan programon pri variaj interesaj temoj. La registraĵoj estas ĉiam akompanataj per teksto por pli facila kompreno. Ĉi-foje ni atentigas vin pri la novaĵoj de la lasta monato kaj pri kontribuadoj de la nova kunlaborantino de la radio, ĈEA-membrino Jaroslava Malá.

Klakinte al Retejo de la Esperanta Retradio aperas en kronologia vico ĉiuj artikoloj, kiujn vi povas sonigi kaj ekvidi la tekston per simpla klako al „Aŭskultu“. Realigite kun teknika subteno de Vladimír Türk.

Inter la juniaj artikoloj aperis i.a.

- Lerni lingvon por peti bieron? 7.6.
- La homo, kiu savis historion 11.6.
- Ju pli bona la mondo, des pli saĝaj la homoj 12.6.
- Kulturoj de mensogado 15.6.
- Virtuala realeco mildigas dolorojn 24.6.
- La sekretoj de la biologia aĝo 26.6.
- Transporto de akvo al duonseka regiono kaj pliaj ne malpli intresaj.

Vi povas tie aŭdi ankaŭ voĉojn de kunlaborantoj el Pollando, Brazilo, Israelo kaj aliaj landoj.

Ni varme rekomendas la projekton por regula uzado, ĉu individua ĉu kadre de instruado en kluboj aŭ kursoj por progresintoj! Pluaj kunlaborantoj (ĉu por traduko de taŭgaj tekstoj, ĉu por sonregistrado) estas plu serĉataj kaj bonvenaj.

Kontakto: retradio@aldone.de

ĈU EŬROPO VERE ĈESAS AMI LA ANGLAN

Jean-Claude Juncker asertis, ke la angla perdas sian gravecon en Eŭropo - ĉu li pravas? "Malrapide sed certe la angla perdas gravecon en Eŭropo," la ĉefo de EU, Jean-Claude Juncker, diris intjare.

Iuj povus vidi liajn komentojn kiel provo akiri la superecon en la intertraktadoj de Briteliro. Aliaj povus aserti, ke li pravas - kiam Britio fine forlasos Eŭropan Union nur Malto kaj Irlando havos la anglan kiel unu el iliaj oficialaj lingvoj.

La statistikoj tamen pentras alian bildon. Ciferoj publikigitaj por la Eŭropa tago de lingvoj, malkaŝas ke 83.5% de EU-bazlernejoj lernadis la lingvon de Ŝekspiro en 2015, la plej lasta periodo por kiu datumoj haveblas. La angla eĉ fariĝis pli populara. La proporcio de junuloj kiuj lernas la lingvon pligrandiĝis je 6% en la du jaroj antaŭ 2015. Sed la britelira referendumo okazis junio 2016!

Procentoj de elementlernejoj kiuj lernas la anglan: (2015)

Svedio:87,9; Finnlando 68,6; Estonio 77,1; Latvio 87,8; Litovio 73,3; Pollando 97,6; Germanio 72,7; Nederlando 42,9; Belgio 36,7; Luksemburgo 100; Aŭstrio 100; Ĉeĥio 73,6; Slovakio 85,9; Rumanio 98,3; Hungario 59,6; Bulgario 82,9; Francio 99,2; Slovenio 49,8; Kroatio 99,9; Italio 98,6; Portugalio 35,4; Hispanio 99,4; Grekio 79,4

Chris Harris (Tradukis Seán Ó Riain)

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de septembro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Maja Tišljár, Dieter kaj Yoshi Kleemann, Retrudio, Ĉriss Harris, Katalin Kovacs

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

